



# TEAM': Reklamo al silento

Hmi F#mi Hmi F#mi Hmi F#mi  
 Televid' reklamas ja la silenton nun ĉiu jam ekflamas pro  
 bela oportun'. Al silent' reklamo vera furoraj'  
 importita silenteg' plej necesa aj'. Eblas en kaŝ' la si-  
 lenton de arbar' havi por via dom'  
 estas garantio, indas la far' akiros ĝin plej ruza  
 hom'.

G A Hmi F#mi Hmi F#mi  
 G A Refr. G A  
 D G A D G A  
 Hmi Hmi

3 x D.C. al Fine

# ORA TEAM'

**Eldonis LF-koop, Svislando  
kaj OPUS, Slovakio, 1989**

## **1. VOLAS NI**

**(Dočekal/Hevier-Ari)**

Ni plej lastas al celo  
veron, revon miksas ni  
kaj niaj patroj sur selo  
pro ni nervas pli kaj pli.

Sidas ni benke kun foto...  
Onidir' Mond' nin dorlotas...  
Onidir'! Onidir', ke tro volas ni!

Vere ni volas ĉion  
aerpuron kun honest',  
sed via mond' estas kaĝo  
kie fermitas ni kiel best'.

Diras vi, ke tio ĉesos  
vi ne scias, sen ni ne eblos  
sed laŭ vi, sed laŭ vi  
jam tro volas ni.

### **Refreno:**

Volas ni (okfoje)  
jes tro volas ni.

Vi ĉiam lasis nin solaj  
senhejme ja fartis ni,  
sed nun ni donas fakturojn  
kaj vi pagos ĉion ĉi.

Nia sinten' eble vin vundos  
kaŝon vi serĉos en frazoj  
sen util', sen util'  
ĉar ni volas pli.

### **Refreno.**

Ni ne volas multon, nur la mondon  
volas preni la neekzistantan  
kaj submaske vidi la vizaĝon  
multon volas ni!

Nun kaj tuj ni volas la neeblan,  
kion la homo eĉ ne rajtas pensi  
ni ne volas multon, nur la mondon  
ne tro volas ni!

## **2. REKLAMO AL SILENTO**

**(Kinček/Hevier-Martinelli)**

Televiĉ' reklamas  
la silenton nun,  
ĉiu jam ekflamas pro  
bela oportun'!

Al silent' reklamo  
vera furorav',  
importita silenteg'  
plej necesa av'.

### **Refreno:**

Eblas en kaŝ' la silenton de arbar'

havi por via dom'.  
Estas garantio, indas la far',  
akiros ĝin plej ruza hom'!

Vico antaŭ fremd-butik'  
longas pli kaj pli  
sed silenton, kara amik',  
baldaŭ havos ni.

Konservita en skatol'  
freŝa kiel lili',  
tiel enormas la feliĉ'  
ke ektimas ni!

### **Refreno**

Al silent' reklamo  
preskaŭ kiel trofe'  
bruas el ĉiuj flankoj  
nin konsternas tre.

Sed denove hantas  
plej terura bru',  
ĉar silent' ekmankas  
jam ne estas plu.

## **3. JEN MIA NUMERO**

**(Habera/Hevier-Martinelli)**

Ĉu povas esti vi grava  
veninte el sonĝoj, lud' kaj kin'?  
Cirkulas dir', eble prava,  
pri multaj, kiuj koncernis vin.

Tro diafanas la ombrelo  
kaj pro tru' ne ŝirmas vin  
kaj kion vi faru el ĝi?  
Sekretaj faltoj  
en la kor' ofendas vin...  
telefonvoku al mi!

### **Refreno:**

Jen mia numero  
alvoku kiam aperos solecoprem',  
senta sincero  
estas ĉe mi amikem'...

Vi estas nur ajnulino  
konata pro sonĝoj, lud' kaj kin',  
sed ŝajnas ke mia destino,  
estonte, certe koncernos vin.

Tro diafanas la ombrelo  
kaj pro tru' ne ŝirmas vin  
kaj kion vi faru el ĝi?  
Sekretaj faltoj  
en la kor' ofendas vin...  
telefonvoku al mi...

### **Refreno**

## **4. VIA ETA TIMO**

**(Antalík/Nemček-Martinelli)**

Ombroj malnovaj kaj flankaj stratetoj  
mucidaj pro malplen' kaj timovekaj.  
La vento vagas tra tegment-tenebro:  
ĝue spionas mi viajn ĉarmajn timojn.

### **Refreno:**

Via eta tim' ravas min,  
de via timema sinten'

estas kaptita l' anim'...  
Via eta tim' ravas min,  
estas kaptita l' anim'  
sed vi volas ja...  
kaŝi ĝin.

Sufokas morta spac' fantomajn domojn,  
hantas sur mur' en kruc' kreto-surskriboj,  
rampas en vent' odor' de krizantemoj:  
kaŝe spionas mi viajn ĉarmajn timojn.

### **Refreno**

... sed vi kaŝas ĝin...

Ĉu jam, ĉu jam venas via timo?  
Ĉu jam, ĉu jam dolĉe ĝi tenas vin?  
Ĉu jam, ĉu jam ni proksimas pli kaj pli?

## **5. LETERO DE VINCENTO**

**(Habera/Hevier-Ari)**

### **Refreno:**

Mi serĉas ĉu mankas,  
dum vipas nin la vipo de hast',  
mi serĉas, ĉu mankas  
la tempo por prokrast'.

Jaroj pasas sen leter'  
atende plu kreskas trist'  
pri amik' tre fora sur la ter',  
ho, pentrist'.

Jam konata, tiu ul',  
freneza Vincent' Van,  
korv-gardist', mallaborul',  
sen ordo, sen plan'.

### **Refreno**

En mond' plasta kaj sen rid',  
nin falsanta ĝis fin',  
la natur' post nia perfid'  
trompas nin.

Eble venos la leter'  
en ĝi, ja neni':  
da sunfloro nur semer'  
el Van, por mi.

### **Refreno**

Vanas jam de mi vespir' plu,  
ĉar ŝajnas nun,  
ke malamikas kalendar'.

Mi scias ke mankas,  
dum vipas nin la vipo de hast',  
mi scias, ke mankas  
la tempo por prokrast'.

## **6. SUR LA SAMA ΣIPO**

**(Dočekal/Jursa-Ari)**

Printempe mi  
frusonĝis ke  
la dom' ne plenas je malam'.  
Falis kradar',  
apertas dom',  
kaj sin salutas ĉiu hom'.

Bela rond'

ĉar ne plu envi',  
simple mirinda mond'.  
Bonan pli  
ĉu elpensis vi?  
Ne, pli bonan ne!

#### **Refreno:**

Ĉiu el ni  
ja sur la sama ŝipo  
ĉiu el ni  
por unu foj'.  
El sama kaj'  
l' unua paŝo  
por sama kaj'  
ĝis forpas'.

Printempe mi  
plu revis ke  
la dom' ne plenas je timem'.  
Falis kradar',  
apertas dom'  
kaj ĉiu tenas sin ĉe man'.

Bela rond...

#### **Refreno**

## **7. ETA ŜTORMO NOKTA**

**(Antalík/Jursa-Ari)**

Eta ŝtormo nokta  
en malhela glas'.  
Okulcento neonblinka  
post via forlas'.

Eta ŝtormo nokta  
troas via mis'.  
Sur la lang' amaro lukta  
de ŝirita kis'.

Reflekt' de lumo,  
puŝo sur pedal',  
kaj sen ŝi la viv' en fumo  
estas la real'.

Eta ŝtormo nokta  
ne muzika plaĉ':  
en la buŝo gusto plora  
senutila aĉ'.

#### **Refreno:**

Eta ŝtormo nokta  
/ Jam kreskas la koler'  
troas via mis'.  
/ kure tra mallum':  
Sur la lang' amaro lukta  
/ ĉesos ĉi ludo nokta  
de ŝiorita kis'.  
/ de via buŝparfum'.

Reflekt' de lumo...  
En flam'  
mi respuros kaj retrovos vin.  
En flam'  
vi ne povos kuri for, knabin'.  
En flam'  
tute vanas kaŝo: vin trovos la am'.

Eta ŝtormo nokta  
en malhela glas'.  
Okulcento neonblinka  
post via forlas'.

#### **Refreno:**

Eta ŝtormo nokta  
/ Jam kreskas la koler'  
troas via mis'.  
/ kure tra mallum':  
Sur la lang' amaro lukta  
/ ĉesos ĉi ludo nokta  
de ŝiorita kis'.  
/ de via buŝparfum'.

En flam'  
mi respuros kaj retrovos vin.  
En flam'  
vi ne povos kuri for, knabin'.  
En flam'  
Via kaŝejo tute vanas jam.  
En flam'  
en despero kreskas mia am'.  
Refreno

## **8. EN KAĈ'**

**(Jursa-Martinelli)**

Jen  
en kaĉ'  
mi troviĝas  
pro la am'.  
Jen  
en kaĉ'  
revirtiĝas  
Donĉuan.

Ne malgranda flirto,  
artefajrav',  
sed animenvolva  
realav'.

#### **Refreno:**

Kaŝ'  
ne plu eblas jam  
rekte al amo  
kuras la kor'.  
En ŝia man'  
nestas mi, infan'...  
El ĉi dramo  
tiru min for!  
Kamarad',  
el kaĉ'!

Maleblas fuŝ'  
jam nun  
ŝi tro belas,  
kamarad'.  
Ĉarm'  
sur la buŝ'  
venkas la koron  
pli ol spad'...

Ĉu li telefonos  
nun al mi?  
Min mortigas la  
melankoli'...

#### **Refreno.**

## **9. RAKONTA SILENTADO**

**(Kinček/Uličny-Silfer)**

Pluv'  
rakontas sen vort', sed

en si doloras ankaŭ rid'...  
ĉu ĝin nomi ted'?

Via  
same nun sonas paŝ':  
laŭ vitral' ĉas inter nin  
silentad', silentad'

#### **Refreno:**

Surda hor'  
en ĝi nun  
rulas nin  
muta film'.

Rol'  
enua por vi plej...  
vane mi legas el via lip':  
vi mutas al mia sol'.

#### **Pluv':**

tra ĝutar' lacas spir',  
vi ŝajnas paĝ' en brokantlibr'  
kaj mi rekonat'.

#### **Refreno.**

Vi ĉifron havas de l' rakont',  
en vort' muto maskon prenis  
el ni, kiu demandos ĉu la am'  
plu spiras, plu spiras...

## **10. NUN NI PLU KUNAS**

**(Dočekal/Jursa-Silfer)**

Tuja la festo  
por principinet' de strat',  
konsulo korta  
kaj reĝo de garaĝ'...  
Ĉu vojon provi,  
perdi, serĉi, trovi  
aŭ nur atendi sur propra la etag'?

#### **Refreno:**

Kongresa balo  
kaj milopa kun'.  
Vi kiu fidas  
kun li, kiu ne.  
Ĉi tie nuni,  
varme kisi sin.  
Tost' je la venk'  
dum pasas la moment'!

Adiaŭ en mult'  
estas ĉiuj sen vi,  
perdita male  
ja estas vi sen ĉiuj!  
Povas vi drinki  
elverŝi vin transborden:  
ne krii tamen  
nur ĝoju en tumult'!

Nun ni plu kunas  
morgaŭ foros ni,  
por sinforĝeso  
dancu sen brid'!  
Nun ni plu kunas  
morgaŭ foros ni,  
ĉesas kongreso ĝis la revid'!

(informoj: marcek@esperanto.sk)